



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

P. BABIN

Jarabono : 80 fkoj

Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1997 — 4

(OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Donkiĥoto



kaj Kon Tiki

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
KonTiki (sekvo)	3-5
La Kvizo de Bernard Golden	6
Rememoroj (Leono Zamenhof)	7-8
La Orkadaj Insuloj (fino)	9-10
Baltaj Lingvoj	11
Ĉirkaŭ Eŭropoj (Gudule)	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

EL GRESILLON

GRAVA !

DANKON

al la geamikoj, kiuj sendis ĉekojn al la Esperanto-Domo por partopreni en la pago de la grandaj elspezoj pri la nepre necesaj laboroj.

La francaj donacintoj ricevos kvitancon, kiun ili rajtos aldoni al la impost-deklaro por profiti de impost-depago.

Pro preseraro estis anoncite en la antaŭa

numero de Kulturaj Kajeroj, ke la esperanto-Domo malfermos siajn pordojn la 19-an de JULIO. Feliĉe tiu informo estas erara. Grésillon akceptos la gesamideanojn jam la 19-an de JUNIO.

Bonvolu nin pardoni.



ĜOJAN
KRISTNASKON!

FELIĈAN
NOVJARON!

ESPERANTO TRA LA MONDO

Kongresoj kaj Renkontoj en 1998: La 83-a kongreso de UEA (Montpellier 1/8/08) pritraktos la temon " Mediteraneo - ponto inter kulturoj". Antaŭkongreso kvartaga okazos en Parizo kaj sestaga postkongreso en la alpa regiono. Infana kongreseto okazos dum la kongreso en Sommières. Informas: Ch. Fettes, St. Columba's College Whitechurch, Dublin 16, Irlando. Tri post-kongresaj ekskursoj estas antaŭviditaj en sudorienta Francio.

-La SAT-Kongreso okazos en Odessa (Ukrainio) de la 18-a ĝis la 25-a de julio. Informoj: SAT, 67 avenue Gambetta, 75020 Paris.

Kongreso de SAT-Amikaro en Quintin Bretonio (11/13/04) Krom la laborhoroj kaj prelegoj okazos ekskursoj en tiu bela regiono. Informoj: 67, av. Gambetta 75020 -Paris.

Internacia Akademia Konferenco pri scienco kaj tekniko en esperanto, en Pekino (19/25/08) Samtempe kaj samloke: Internacia Esperanta Somera Semajno por geknaboj kaj gejunuloj. Adreso: Sciencista-Teknika Esperanto-Asocio, ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj, 52, Sanlihe, Beijing 100864, Ĉinio.

Fervojista kongreso en Aalborg, Danio, (16/22/05.)

Ekumena kongreso en Nantes (Francio) 25/07 - 01/08.

Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Rijeka, Kroatio, 25/07-01/08.

Internacia Junulara Festivalo, Lignano-Sabbiaadoro (Udine), Italio, 08/04-14/04.

Porhistoria simpozio: Esperanto estis uzata lingvo dum simpozio inter japanoj kaj koreoj organizita de esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio, por sincere interparoli pri la pasintaj rilatoj inter la du landoj. (Oni scias, ke Koreio estis perforte aneksita al Japanio de 1910 ĝis 1945). La simpozio okazis en Kobe, Japanio (29/31/08)

En la Universitato de Amsterdam: Esperanto kaj interlingvistiko estas nun plenrajta parto de la instruado en la universitato de Amsterdam. Inter la multaj kandidatoj por la katedro estis elektita 29-jara nederlando lingvisto d-ro Marc van Oostendorp. Doktoriginta en Tilburg, li laboras ĉe la nederlanda instituto de lingvistiko en Lejden.

Altnivela Konferenco de OSIEK

Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj organizis en Rafina, Grekio, (12/18/07-97) konferencon kun prelegoj pri la temo: "Helenaj influoj en la mondkulturo". Fernando de Diego estis premiita pro sia traduko de "Cent jaroj de soleco" de Gabriel Garcia Marquez. En 1998 la OSIEK-konferenco okazos en Trieste.

Kelkaj libroj - "Vivoj sekaj", brazila romano de Graciliano Ramos, tradukita de L.H. Knoedt. La batalo de malriĉa bovisto kontraŭ sekeco kaj malsato en Brazilio.

La krimromanoj kaj noveloj de la aŭstralia esperantisto Ron Gates: "La septaga murdenigmo", "Kolera afero", "Morto de sciencisto", "Tria kolekto de krim-noveloj", "Sep krimnoveloj",...

- "Dudek poemoj amaj kaj unu despera kanto" de Pablo Neruda, tradukita de Fernando de Diego.

"Bildstria Gvido al Genetiko" de L. Gonick - M. Wheelis, tradukita de Sung Ho Cho.

"Sezaranoj miaj fratoj!" de Michel Prodeau, tradukita de Ch. Rivière.

"La maljunulino kiu paŝis en la maro" de San Antonio, tradukita de A. Le Quint kaj J. Le Puil.

Pri komputiko- Ekzistas la jena faka asocio: "ELTEKO" (Internacia laborgrupo pri Elektroniko, TElematiko kaj KOmputiko) Adreso: S-ro Duhme, Friedensplatz 4, DE-35037 Marburg, Germanio.

Artistinoj en kasedoj- Sur sonkasedoj, jen la recitaloj (rakontoj, poemoj) de du aŭtentikaj artistinoj: " Teatra vespero de Vida Jerman , kroata artistino" - " Mi rompas mian rutinon ", de Georgina Al-manza el Kubo.

KON TIKI

(SEKVO)

... Multajn jarojn poste mi sidis, kun alia maljuna viro, ĉi tiun fojon en malluma kontoro en iu etaĝo de granda muzeo en Nov-Jorko. Ĉirkaŭ ni en bone prizorgitaj vitroŝrankoj kuŝis mortaj pecoj de pasinta realeco kiel spuroj en la pasinteco. La muroj estis cetere plenaj de libroj. Kelkajn el ili unu viro skribis, kaj apenaŭ dek viroj legis. La maljuna viro, kiu estis leginta ĉiujn ĉi tiujn librojn kaj skribis kelkajn el ili, sidis, blankhara kaj bonkora, ĉe la labortablo... "Vi eraras, plene eraras", li diris. - "Sed vi ja ankoraŭ ne legis miajn argumentojn", kaj esperplene mi kapsignis al la manuskripto kuŝanta sur la tablo. "Argumentoj", li diris. "Vi devas pritrakti etnografiajn problemojn ne kiel ian detektivenigmonton!" - "Kial ne", mi diris. "Mi bazis ĉiujn konkludojn sur propraj observoj kaj sur la faktoj, kiujn la scienco prezentis." - "La tasko de la scienco estas nur pura ekzamenado. Ne provu pruvi ion!" Li singarde forŝovis la nemalfermitan manuskripton kaj apogis sin sur la tablo. "Estas vere, ke Sud-Ameriko havis unu el la plej strangaj civilizacioj de la pasinta tempo kaj ke ni scias nek kiuj la homoj estis nek kien ili malaperis, kiam la inkaoj akiris la potencon. Sed unu aferon ni tamen certe scias: ke neniu el la popoloj de Sud-Ameriko translokiĝis al la insuloj en Pacifiko." Li rigardis min profundpense kaj daŭrigis: "Ĉu vi scias kial? La respondo estas sufiĉe simpla. Ili ne povis tien veni. Ili ne havis ŝipojn!" - "Ili havis flosojn," mi hezite respondis. "Flosojn el balzalligno". La maljuna viro ridetis kaj diris trankvile: "Nu, provu vojaĝi de Peruo al Pacifikaj insuloj sur balzafluso."... Mi metis la manuskripton sub la brakon kaj iris malsupren en la svarmadon de la strato.

..."Karlo", mi diris, "Mi tiom fidas je tio, ke la indianoj transveturis Pacifikon sur siaj flosoj, ke mi estas preta mem konstrui tian floston kaj transvojaĝi la maron nur por pruvi, ke tio estas ebla." Mia amiko supozis ke mi ŝercas, kaj ridis iom timeme je la penso. "Vi do opinias tion ne ebla?" - "Ho, vi estas freneza; sur fluso?" Li ne

sciis kion diri kaj nur gapis al mi, kvazaŭ li atendus rideton, kiu montrus, ke mi ŝercas. Li ne trovis ĝin...

...Ŝipo, kiu rezistas la ondojn proksime al la bordo, ankaŭ rezistos ilin malproksime. Mi eksciis ankaŭ, ke inter altaj ondoj la grandaj ŝipoj pikas la pruon aŭ la poŭpon en la ondegojn, tiel ke tunoj da marakvo verŝiĝas sur la ŝipon kaj ŝtaltuboj tordiĝas kiel risortoj. Malgranda ŝipo tamen inter la samaj ondoj ofte pli bone kondukas, ĉar ĝi havas sufiĉan spacon inter la ondoj por flosi sur ili kiel mevo. Okazis, ke maristoj saviĝis en malgranda savboato, post kiam la ondoj subakvigis la ŝipon. La maristoj, kiujn mi renkontis sciis malmulte pri flosoj. Fluso ne estas ŝipo. Ĝi estas nur io naĝanta per kio oni savas sin en danĝero, ĝis oni estas trovata de iu ŝipo. Unu en ili tamen fidis je flosoj sur vasta maro; li estis drivinta sur fluso dum tri semajnoj, post kiam germana torpedo subakvigis lian ŝipon meze en Atlanta maro. "Sed oni ne povas navigacii", li aldonis, "Ĝi drivas flanken, malantaŭen kaj turniĝas laŭ la vento"...

...Iun sabaton mi faris decidon. Mi eniris ŝipekipan vendejon, kie oni titolis min "kapitano", kiam mi aĉetis pilotkarton pri Pacifiko. Kun la karto sub la brako mi vojaĝis al Ossining, kie mi estis konstanta semajnofina gasto ĉe juna norvega paro en belega kampara bieno. Li estis antaŭe ŝipestro. Mi malvolvis la karton sur la herbo kaj demandis al Wilhelm, ĉu li opinias, ke fluso povus sen pereco porti homojn de Peruo ĝis Sudmaraj insuloj. Duone mirigite li rigardis min pli ol la karton sed tuj respondis jese... "Sed estas same granda ŝanco por malsukceso.. La pratempaj indianoj en Peruo certe profitis je la spertoj de multaj generacioj. Por ĉiu fluso, kiu atingis Polinezion, eble dek malsukcesis, eble cent dum la paso de la jarcentoj. Kiel vi diras, la inkaoj navigaciis sur la maro per tuta aro da balzafluso. Se io okazis, la najbara fluso povis savi la malfeliĉulojn. Sed kiu savos via, meze sur la maro?"

... La venontan semajnfino mi ree estis en Ossining kun la karto sub la brako. Kaj hejmenveturante mi estis desegninta longan krajan linion de la marbordo de Peruo ĝis Tuamoto-insuloj en Pacifiko. Mia amiko, la ŝipestro, perdis la esperon, ke mi forlasos la ideon, kaj ni dum horoj kune

sidis kalkulante la verŝajnan drivadon de la floslo. "97 tagnoktojn", diris Wilhelm, "sed memoru, ke tio validas nur por teorie idealaj cirkonstancoj, kun daŭre favora vento, kaj se la floslo efektive estos velkapabla. Vi devas absolute kalkuli je kvarmonata vojaĝo sed pretigi vin por multe pli." - "Bone," mi kontente diris, "ni kalkulu je almenaŭ kvar monatoj, sed ni faru ĝin dum 97 tagnoktoj".

... Miaj pensoj okupiĝis pri ĉi tiu ekipo ĉe la matenmanĝo en la marista hejmo la postan matenon, kiam bonvestita, atleta juna viro venis al mia tablo kun sia matenmanĝaĵo sur pleto. Li sidiĝis. Ni interparolis kaj montriĝis, ke ankaŭ li ne estas maristo. Li estis inĝeniero de la Altlernejo de Trondheim, kaj li estis en Ameriko por aĉeti maŝinpartojn kaj praktikii malvarmigiteknikon. Li loĝis en la proksimo, kaj ofte manĝis en la marista hejmo, ĉar ĝi havis bonegan norvegan kuiradon. Li demandis, pri kio mi okupiĝas, kaj mi mallonge rakontis al li pri miaj planoj. Mi diris, ke se mi ne ricevos pozitivan respondon pri mia manuskripto ĝis la fino de la semajno, mi faros ĉion eblan por efektiviĝi la flos-ekspedicion. Mia tablokunulo ne diris multe pri tio, sed tre atente aŭskultis.

Kvar tagojn poste ni ree renkontiĝis en la sama manĝosalono. "Ĉu vi decidis, ĉu vi faros tiun vojaĝon aŭ ne", li demandis. "Jes", mi diris. "Mi vojaĝos" - "Kiam?" - "Kiel eble plej baldaŭ. Se mi tro malfruiĝos venos la ventegoj de suda glacimaro kaj ankaŭ la sezono de uraganoj ĉirkaŭ la insuloj. Mi devas forlasi Peruon post nur kelkaj monatoj, sed unue mi devas akiri monon kaj aranĝi la tutan aferon". - "Kiom da viroj partoprenos?" - "Mi opinias, ke ni estu entute ses viroj. Tio donos sufiĉan varion dum la kunvivado sur la floslo kaj sufiĉos por kvarhora direktilejforado dum unu tagnokto". Li staris kvazaŭ cerbumante dum tempeto kaj poste diris kun akcento: "Mi havas egan emon partopreni ĉi tion. Mi povus preni sur min la mezuradon de ventoj, fluoj kaj ondoj. Memoru, ke vi drivos tra grandegaj regionoj, kiuj estas preskaŭ nekonataj, ĉar ili estas ekster ĉiu ŝiptrafiko. Tie tia ekspedicio povos fari interesajn hidrografiajn kaj meteorologiajn esplorojn kaj mi povus utiliĝi miajn termodinamikajn sciojn." Mi ne sciis pli pri la viro ol tion, kion sincera vizaĝo povas malkaŝi.

Okazas, ke ĝi malkaŝas tre multe. "Bone", mi diris, "ni vojaĝu kune."

La viro nomiĝis Herman Watzinger; li estis "terulo" kiel mi. Kelkajn tagojn poste mi kunprenis Herman kiel gaston al "Eksplorers' Club". Tie ni tuj renkontis la polus-esploriston Peter Freuchen. Freuchen havas bonan econ, ke li neniam pereas inter la homamasoj. Grandega kiel pordo kaj kun granda barbo, li aspektas kiel ambasadoro de la vasta tundro. Estas atmosfero ĉirkaŭ li, kvazaŭ li ĉirkaŭpromenus kun urso kiel hundo. Ni akompanis lin al granda karto sur la muro kaj rakontis al li pri niaj planoj. Liaj knabecaj, blujaj okuloj grandiĝis kaj li tiris la barbon dum li aŭskultis. "Oj, kia plano. Volonte mi kunvojaĝus."...Per la entuziasmo de Freuchen por favori nian planon la afero komencis kreski danĝere rapide kaj baldaŭ la skandinava gazetaro sciis pri ĝi....Vizitis nin du energiaj, junaj gazetistoj, kiuj preskaŭ krevis pro agemo kaj ideoj. Ĉe botelo da bona viskio nia gastiganto diris, ke li estas interesita pri nia ekspedicio. Li proponis havigi al ni sufiĉan kapitalon, se ni konsentos kontrakti pri gazetaj artikoloj kaj prelega vojaĝo post la hejmenveno. Fine ni akordiĝis kaj totis je feliĉa kunlaboro. De nun ĉiuj niaj problemoj estis solvitaj...

...Oni devas zorge elekti grupon de viroj, kiuj kune drivos sur la maro. Povos okazi ribeloj kaj tumultoj post kelksemajna izoleco sur la maro. Mi ne volis dungi maristojn; ili ne sciis pli pri floslo drivado ol ni mem, kaj mi ne deziris, ke oni poste diru, ke ni sukcesis pro tio, ke ni eble estis pli lertaj maristoj ol la antaŭaj floskonstruistoj en Peruo. Tamen ni bezonis viron, kiu almenaŭ scias uzi sekstanton kaj mezuri nian drivadon trans la maron, kiel bazo por la sciencaj raportoj. "Mi konas kuriozan art-pentriston", mi diris al Herman. "Li estas grandega viro, kiu scias ludi gitaron kaj estas plena de humoro. Li trapasis navigacian lernejon kaj ĉirkaŭvojaĝis la mondon plurfoje, antaŭ ol li trankviliĝis hejme kun peniko kaj paletro. Mi konas lin de nia knabaĝo kaj ofte faris kune kun li piedekskursojn en la altmontaro. Mi skribos al li kaj demandos. Li certe partoprenos.

...Ni bezonas ankaŭ iun, kiu konas radion. "Tio ne konvenas sur prahistoria floslo." - "Ne diru tion. Estas sekurigaĵo,

kiu ne influas vian teorion, dum ni ne elsendas SOS por helpo. Ni bezonas radion por elsendi veterajn observojn kaj aliajn raportojn. Ni tamen ne povos profiti de la ŝtormavertoj, ĉar ne ekzistas antaŭdiroj por tiu parto de la maro, kaj eĉ se estus, kiom ili helpus nin sur flosa ? "Liaj argumentoj iom post iom dronigis ĉiujn miajn protestojn, kiujn ĉefe kaŭzis mankanta amo al kontaktiloj kaj turnbutonoj. "Kurioze," mi konfesis, "kiam temas pri radiokontaktoj tra grandaj distancoj per tre malgrandaj aparatoj, mi havas la plej bonajn rilatojn. Mi estis en tia radiosekcio dum la milito. Vi scias, ĉiu viro en la ĝusta loko. Mi skribos al Knut Haugland kaj Torstein Raaby..."

"...Mi skribis mallongan leteron: "Intencas vojaĝi sur flosa trans Pacifikon por pruvi teorion, ke Sudmaraj insuloj estis ekloĝataj el Peruo. Ĉu vi deziras partopreni ? Mi garantias nenion krom senkosta vojaĝo al Peruo kaj Sudmaraj insuloj kaj ree hejmen kaj ke vi bone utiligos viajn teknikajn sciojn dum la vojaĝo. Respondu kiel eble plej baldaŭ." Jena telegramo tuj venis de Torstein: "Partoprenos. Torstein." Ankaŭ la aliaj respondis jese..."

"...Dume Herman kaj mi devis prizorgi la proviantan problemon. Ni ne intencis manĝi malnovan lamo-viandon aŭ sekigitajn batatojn dum la vojaĝo, ĉar ni vojaĝos ne por pruvi, ke ni iam estis indianoj... Antaŭ kelkaj tagoj estis veninta nova asistanto al la norvega militataŝeo en Vaŝingtono...Mi letere informis lin pri la situacio kaj petis lin trovi kontaktviron ĉe la proviantadministranto de la amerika armeo. Du tagojn poste ni telefone parolis kun li. Li estis kontaktinta la oficiron por eksterlandaj aferoj en la amerika militdepartemento, kaj tie oni deziris scii la celon de la entrepreno..."

"...Post senfinaj iradoj en koridoroj kaj flankkoridoroj, ni atingis la eksterlandan sekcion. Tie ni sidis ĉirkaŭ mahagona tablo, kie la ĉefo de la sekcio prezidis. La elokventeco de la kolonelo kaj favora fino de uragansimila ekzamenado de la oficiroj ĉirkaŭ la tablo iom post iom igis lin vidi la aferon de nia flanko. Li leviĝis kaj donis al la stabo koncizan ordonon, ke oni helpu nin al la ĝustaj personoj. Laŭ mia opinio ĉio feliĉe estis finita, kiam la alta, agrabla kolonelo subite diris: "Nun ni devas paroli

kun la "ĉefo"; estas li, kiu decidus...Ni trovis, ke la ĉefo estas malgranda, tre serioza oficiro. "Bone, kion deziras tiuj sinjoroj ?" - "Nur bagatelojn". La kolonelo, per malmultaj vortoj, klarigis nian tutan deziron. "Kaj kion vi povos doni al ni rekompence", demandis la ĉefo; malvarme lĝis silente en la ĉambro. Neniu el ni diris eĉ vorton. "Sed," aldonis la ĉefo, "ankaŭ kuraĝo kaj esploremo valoras. Kolonelo, donu tion al ili..." Ni ricevis multajn bonajn konsilojn kaj sortimenton da brita ekipaĵo flugportatan el Anglujo por esti provata dum la flosveturado. La brita sanitara ĉefo estis entuziasma pledanto por mistera "ŝarkopulvoro". Ni ŝutu iomete de la pulvoro sur la akvon, se la ŝarkoj estos tro altrudemaj, kaj ili tuj foriĝos. "Ĉu ni povas fidi al tiu pulvoro ? - "Ĝuste tion ni mem volonte scius."

"...Ni baldaŭ trovis, ke nek gazetaro, nek privataj iniciatuloj kuraĝas doni monon al tio, kion ili mem kaj ĉiuj asekuraj kompanioj rigardas sinmortiga vojaĝo, sed se ni revenos vivaj, tiam estos alia afero.... Sed jen ree aperis kolonelo Munthe-Kaas. "Ĉu vi havas problemojn, knaboj ? Jen ĉeko por komenci. Mi ricevos ĝin, kiam vi revenos de Sudmaraj insuloj..."

"...La malnovaj flosoj en Peruo estis konstruitaj el balzalgno, kiu, en seka stato, estas pli malpeza ol korko. Ni intencis fari la samon. Sed ni ne kuraĝis veni al Sud-Ameriko kun kestoj kaj kofroj plenaj de strangaj objektoj por levi la ĉapelon kaj ĝentile peti per malbona hispana lingvo, enirpermeson por elvojaĝi sur flosa. Oni metus nin en malliberejon. Ni bezonis oficialan rekomendon. Unu el niaj amikoj estis korespondanto ĉe Unuigitaj Nacioj. Li kunprenis nin tien per aŭto... Li trovis unu el la delegitoj de Peruo kaj poste unu el la reprezentantoj de Ekvadoro. Ili fervore aŭskultis nian planon kaj promesis informi siajn registarojn. Ili garantiis al ni bonan helpon... Ni aĉetis du biletojn kaj flugis al Sud-Ameriko...Nun ni estis survoje al la aventuro."

(El "Ekspedicio Kon-Tiki" verkita de Thor Heyerdahl, trad. de C. Brynildsen)

ESPERANTO EN SVEDIO

Mezuru la amplekson de via scio pri Esperanto en Svedio per jenaj dek demandoj, kiuj konsistas el dato, urbdomo kaj kelkaj vortoj aludantaj al okazintaĵo en tiu loko. Ĉu vi povas aldoni detalojn por identigi la eventojn kaj partoprenintojn?

1- 1889 - Ystad - sveda lernolibro de Esperanto.

2- 1895 - Upsalo - eldono de grava internacia periodaĵo.

3- 1899 - Köping - naskiĝo de elstara funkciulo de IEL kaj UEA.

4- 1928 - Göttenburgo - internacia kongreso de neneŭtrala organizaĵo.

5- 1933 - Stokholmo - internacia kongreso de neneŭtrala organizaĵo.

6- 1934 - Stokholmo - internacia kongreso de neŭtrala organizaĵo.

1948 - Malmö - internacia kongreso de neŭtrala organizaĵo.

8- 1956 - Frostavallen - starigo de principaro.

9- 1967 - Borås - morto de hungardevena svediano.

10- 1969 - deklaracio pri starpunkto.

RESPONDOJ:

1- En 1889 estis eldonita de d-ro Zamenho en Varsovio Internationelt Sprak - Företal och Fullständig Lärobok, la "Unua Libro" de d-ro Esperanto, tradukita en la svedan lingvon de Gustaf Henriclundquist (1865-1930), juna studento en Ystad, Skanio.

2- Post la ĉeso de "La Esperantisto", nova periodaĵo kun la titolo "Lingvo Internacia" aperis en 1895 en Upsalo, urbo kiu fariĝis la tiutempa organiza centro de la Esper-

anto-movado pro la aktivado de la tiea Klubo Esperantista, fondita en 1891. Vladimir Gernet el Odeso, estis la mecenato kaj direktoro de "Lingvo Internacia", kaj la ĉefaj redaktoroj estis Valdemar Langlet (1872-1960) kaj Paul Nylen (1870-1958).

3- Ernfrid Carl Malmgren (1899-1970), popolinstruisto, esperantiĝis en la 1920aj jaroj, funkciis kiel estrarano de UEA (1934-1956), vicprezidanto de Internacia Esperanto Ligo (1938-1947) kaj la unua prezidanto de la reunigita UEA-IEL ekde 1947. De 1962 ĝis 1970 li estis honora prezidanto de UEA.

4- La 8-a Internacia Kongreso de la laborista organizaĵo SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) estis aranĝita en Göttenburgo en 1928 kun la helpo de la ĉefaganto de la laborista movado en Svedio, Einar Adamson (1894-1953). Ĉeestis 500 kongresanoj. La plej grava evento dum la kongreso estis la minaco de skismo en SAT pro la atako, kiun Ernest Drezen lanĉis kontraŭ E. Lanti, la fondinto de tiu organizaĵo.

5- La 13-a kongreso de SAT kun 600 gekongresanoj el 16 landoj okazis en Stokholmo en 1933. La partoprenintoj aŭdis la abdikon deklaron de la fondinto de SAT, E. Lanti, kiu, pro atakoj kaj kalumnioj kontraŭ li, ekisigis de la prezidanteco por entrepreni mondvojaĝon kaj dediĉi sin al studado kaj verkado.

6- En 1934 la sveda ĉefurbo gastigis la 26-an Universalan Kongreson de UEA. Partoprenis 2042 anoj el 34 landoj. La prezidanto de la kongreso estis Teodor Julin, poŝta funkciulo kaj parlamentano.

7- Dek kvar jarojn post la 26-a Universala Kongreso de UEA, en 1948, denove okazis Universala Kongreso en Svedio, la 33-a, en la urbo Malmö. La nombro de kongresanoj estis 1761, kaj la prezidanto de la kongreso estis Jan Strönné.

8- Ses fojojn, en 1953, 1954, 1956, 1959, 1962 kaj 1972, Svedaj Someraj Semajnoj estis organizitaj en Frostavallen, apud Höör. Ili estis kulturaj aranĝaĵoj kun prelegoj, diskutoj kaj studrondoj. En 1956 konvenis reprezentantoj de informaj fakoj por pri-trakti la informadon pri Esperanto. Iliaj konkludoj estas entenataj en "Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo", pli bone konata kiel la "Principaro de Frostavallen".

(sekvo sur paĝo 9)

REMEMOROJ

D-ro LEONO ZAMENHOF

Jen unu el la epizodoj de mia vivo antaŭ 25 jaroj. Mi tiam (en 1905) estis kuracisto en la rusa armeo dum la rusjapana milito. Oni ne bezonas diri, ke Rusujo, kiel reprezentanto de l'eŭropa civilizacio en Ĥinujo, ne elvokis grandan entuziasmon por si inter la tiea loĝantaro. Estis do tute nature, ke la ĥinoj rigardis nin, kiel siajn plej malestimaĵojn. Kaj tamen tiu ĉi ne civilizita popolo elmontris tiel grandan animkulturon en unu rilato, ke mi ĝis nun rememoras pri ĝi kun granda admiro.

En la rusa armeo estis malgranda ono, kiu diferenciĝis de la tuto per sia efektive altkultura konduto - ĝi estis la kuracistaro, alvokita al militservo el la civila loĝantaro. La rusaj kuracistoj efektive tre bele portis sian metian standardon. Ili eksentis de la unua momento la ĥinoj kaj malgraŭ malkompreno de la lingvo rusa, ekŝatis ilian grandan valoron. Ni, kuracistoj, tion klare vidis kaj niavice faris ĉion eblan por pravigi tiun ĉi konfidon al ni. La plej grava pruvo de tiu ĉi konfido estis la fakto, ke la ĥinoj, kiuj ĉiam kaŝis plej zorge siajn virinojn antaŭ la nesatigebla apetito de la rusa armeo, sentime enirigis nin en siajn familiojn.

La ĥinoj tute ne estis blindaj entuziasmoj; kontraŭe: ili vidis en ni homojn tiel same neperfektajn, kiel la aliaj, sed ili kredis je nia bona intenco kaj sindono de nia homama metio. Plej bone ilustras tion la nomoj, kiujn ili donis al ni, kuracistoj. Estas malfacile traduki ilin esperanten. Mi tamen provos tion fari. La ĥinoj dividis kuracistojn en tri kategoriojn: "kmirailo", "multo-kmirailo" kaj "ŝirbo-multo-kmirailo". Tiu vorto estis stranga ĵargono, kiu nature devas aperi ĉe la renkonto de du malsamaj tute fremdaj lingvoj. Tradukitaj esperante ili signifas proksimume: "mortig-ulo", "pli granda mortigulo", kaj "plej granda mortigulo", tri laŭrangaj gradoj de militkuracistoj. Tiu ĉi sprita difino de nia kuracistaj valoroj plej bone montras, ke la ĥinoj ne vidis en ni ĉiopovajn diojn, sed nur simplajn bonajn homojn.

La fakto, kiun mi sube rakontas, plej

elokvente montros al vi tiun ĉi neordinaran rilaton de la ĥinoj al ni, kuracistoj. La milito alproksimiĝis al la fino. Iam mi ricevis leteron de mia frato F. ankaŭ kuracisto, kun sciigo ke li alvenis Ĥinujon kun unu el la lastaj transportoj el Rusujo. La lokon de sia halto li difinis ne precize per la vortoj: "inter 6- kaj 68 stacidomoj". En Ĥinujo la stacidomoj plej parte estis sennomaj kaj havis, dum la milito, nur laŭvicajn numerojn. Ne vidinte longan tempon mian fraton, mi decidis viziti lin, tute ne antaŭsentante la malfacilecon de tiu ĉi entrepreno.

Estis varmega julia tago. Mi eksidis en la unua transportvagonaro kaj farinte la tutan vojaĝon sur lokomotivo mi petis la maŝiniston halti ĝuste sur la duono de la distanco inter 6- kaj 68 haltlokoj. Estis jam la tria horo posttagmeze. La varmo estis netolerebla. Forlasinte la lokomotivon, mi turnis min al la stacidoma gardisto kun la demando, kie troviĝas la malsanulejo, kiu alvenis antaŭ kelkaj tagoj el Rusujo. La soldato montris al mi direkton, ne sciante difini pli proksime la lokon. Mi senpripiense decidis iri al la montrita direkto. La kampo estis kovrita per maturiĝanta "gdolono", speco de greno, kiu somere kreskas sur la tuta ebenaĵo de norda Ĥinujo. Ĝi estas tiel alta, ke oni povas facile sin kaŝi, eĉ sidante sur ĉevalo. Farinte kelkajn paŝojn antaŭen, mi tute dronis en la senfina maro de tiu gdolono. Kiam mi post kelka tempo ĉirkaŭrigardis la situacion, mi vidis min ĉirkaŭata de nepenetrebla arbaro de gdolono kaj mi tute perdis la orientiĝon. Mi volis reveni, sed estis neeble; mi ne retrovis la vojeton per kiu mi eniris. Mi provis voki la gardiston, sed vane. Vole-nevole mi iris antaŭen, serĉante ian ajn eliron el la ĉirkaŭanta gdolono. Post kelke da tempo fine mi ekvidis kampeton. Mi ekspiris pli libere. Ĉirkaŭrigardante tiun ĉi novan lokon mi rimarkis kelkajn ĥinojn laborantajn sur la kampo. Mi ne sciis kie mi estas, sed mi tuj orientiĝis, ke mia situacio ne estas bona. En mia kapo subite reviviĝis ĉio, kion oni skribis kaj rakontis pri ĥinaj banditoj nomitaj "hunhuoj", pri iliaj kruelaj aĵoj kaj pri averto de rusa armeestraro, ne deflankiĝi de la ĉefaj vojoj pro danĝero enfali en la manojn de hunhuoj. Mian ŝanceliĝon ŝajne rimarkis la ĥinoj, rigardante min suspekto: supozeble mia mieno ne estis tiel heroo, ĉar mi ekvidis rideton sur la vangoj de la knabo, kiu estis kun ili. Mi

ekprovis paroli kun ili per rus-hina ĵargono, sed ili min ne komprenis. La situacio fariĝis ĉiam pli malagrabila. La ĥinoj komencis murmureti inter si, rigardante min deflanke. Precipe unu inter ili ne elvokis al mi konfidon al li. Li estis granda muskola viro kun straba okulo kaj kun granda pik-fosilo en la mano; Mi komencis paroli geste, ekzitis la suprecititajn vortojn rusingajn difinantajn kuracistojn por klarigi al ili, ke mi serĉas malsanulejon, en kiu troviĝas multaj "divers-mortiguloj". Ili respondis per gestoj kaj eĉ jesis per la kapoj kaj fine proponis al mi sekvi ilin. Mi nenion komprenis kaj estis certe, ke ili ankaŭ min tute ne komprenis. En mia ekscitita fantazio ŝajnis al mi, ke ili deziras konduki min al siaj kunuloj. Mi tamen faris ĉion eblan por ŝajnigi al ili trankvilecon. La irado ŝajnis al mi senfina. La grandega varmo faris mian situacion ankoraŭ pli netolerebla. Fine mi rezignis eĉ la penson min savi kaj meditis nur, kiamaniere defendi min en la okazo, se la hunhuzoj komencos min turmenti antaŭ la morto. Tion pripensante mi postiris miajn kondukantojn, tenante en la mano kiel minacon, neŝargitan revolveron ! Mi rezigne atendis la epilogan.

Enprofundiĝinta en miajn pensojn, mi tute ne rimarkis, kiel mi subite aperis ĉe unu el la ĉefaj vojoj kaj en kelkaj paŝoj de mi ekstaris rusa soldato ! Aŭtomate elŝiriĝis el mia brusto laŭta ekkrio. Min neniam tiel ĝojigis la vido de soldato, kiel en tiu ĉi momento ! Vi povas diveni, ke kune kun tiu ĉi vido revenis al mi mia "braveco". Mi ekrigardis la kondukintajn ĥinojn estante certa, ke ili forkuros. Sed kia estis mia mirego, kiam mi ekvidis, ke ili staras tute trankvile apud mi kaj eĉ ĝoje rigardis la soldaton. Kaj jen anstataŭ ĝojo koron mian ekpremis malagrabila sento...Do ĉio estis nur malsana fantazio ! La ĥinoj ne estis hunhuzoj. Ili min ne kondukis al morto, sed efektive tien, kien mi deziris. Mi vidas jam la ironian rideton sur la vangoj de kara leganto. Permesu do iomete min senkulpigi. Mia situacio estis ridinda nur duone. Kiam mi rakontis la tutan incidenton al la kolegoj ili tute ne ridis. Ili estis mirigitaj, ke la incidento finiĝis tiel feliĉe. Ĉiutage okazis kelkaj mortigoj de soldatoj, kiuj iom nesingarde forlasis la tendaron. La loka loĝantaro tiamaniere venĝis sin je la rusoj pri ĉiuj maljustaĵoj, kiujn ĝi suferis dum la milito. Se mi estis savita, mi devis danki al

escepta feliĉo. Min savis la signo de kuracistoj, kiun mi portis sur la ŝultroj ! La ĥinoj efektive neniam atakis kuracistojn, eĉ se ili estis sendefendaj ! Ĉu tio ne estas bela ekzemplo de estimo por la medicino ?

Mi ne scias, ĉu tiu ĉi rakonto efikos sur vin, kara leganto, en la senco reestimi vian kuraciston. Ĉiuokaze estas interese konatiĝi kun la ĥinaj moroj. Se vi ne konfidas al via kuracisto, faru la samon, kion jam antaŭ multaj jaroj faris la prudentaj ĥinoj pagante al siaj kuracistoj ne por la malsanaj tagoj de sia vivo, sed por la sanaj; tiam vi estos almenaŭ certa, ke la kuracisto sincere laboros por ke vi estu efektive ĉiam sana !

(Literatura Mondo - 1931



(sekvo de paĝo 7)

9- En Borås, en 1967, mortis Ferenc Szilagyi, kiu naskiĝis en Budapeŝto en 1895. Li esperantiĝis en 1924, venis al Svedio en 1932 por gvidi Esperanto-kursojn kaj definitive ekloĝis en la lando, fariĝante sveda civitano. Inter liaj multflankaj literaturaj agadoj estas menciindaj la fondo kaj redaktado de la kultura revuo "Norda Prismo" (1955-1967) kaj kvin "Rapsodioj", kolektoj da prozo kaj poezio originala kaj tradukita (1943-1953). Szilagyi tradukis 20 novelojn de 16 svedaj aŭtoroj en la kolekto "Sveda Novelaro" (1950).

10- Okaze de la 25-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Orgabizo) en Tyresö, estis akceptita deklaro de tiu politike mobilizita junulargrupo, kiu malaprobas lingvan kaj kulturen diskriminacion.

Bernard GOLDEN

LA ORKADAJ INSULOJ

IRENE BENNETT

(FINO)

La ekonomia vivo nuntempe bone prosperas. La procentaĵo de senlaboruloj atingas proksimume ne pli ol la duonon de la skota averaĝo., ĉiujare pli/malpli kvin elcentoj. Preskaŭ ĉie la orkadaj insuloj aspektas kiel verda kamparo, kaj efektive farmado restas ĝis la nuno kiel la akso de la ekonomio. Superas bovbredado precipe por produktado de viando; ankaŭ gravas samcele ŝafbredado. Somere la brutaro paŝtas sur la riĉaj herbejoj kaj vintre ili sin nutras per furaĝo el loko kreskigitaj svedaj rapoj kaj hordeo, kune kun la herbo tondita somere kaj konservita en insiluloj. Renomiĝas la elstare bona kvalito de orkada bovaĵo. Tamen, malgraŭ tio, ke la brutaro ne infektiĝis per la tiel nomata "freneziga malsano", la estanta eksportada malpermeso kaj hodiaŭaj leĝaj reguloj efektivigendaj malprofitigas ankaŭ orkadajn farmistojn same kiel ĉie aliloke.. Pri kvalito, same, renomas orkadaj laktoproduktaĵoj, precipe fromaĝoj, kiuj konkurse tra Britio ofte premiigas per oraj medaloj. Tiaj produktaĵoj devenas de tute aliaj gregoj paŝtadataj nur por melkado.

Krom agrikulturaj okupoj ankaŭ gravas al orkadaj loĝantoj industrioj rilate turismon, nafton, fiŝojn kaj artaĵojn. Kreskas ĉiam pli la turisma industrio; nuntempe enspezo ŝuldata al turismaj allogaĵoj egalas, kaj eĉ superas, la enspezon, kiun venigas agrikulturaj agadoj.

Ankaŭ multe kontribuas al prospero de Orkado dum la lastaj dudek jaroj nafta instalaĵo starigita en 1977 sur la insulo Hotta. Petrolaj duktoj el la petrolfontaj regionoj en la Norda Maro alteriĝas tie. Alveninte la kruda nafta miksaĵo seniĝas je sablo, salo, gaso kaj akvo. Sekve, la purigita nafto enŝipiĝas por pluenvojaĝi ĝis petroldistilejoj aliloke en Britio. Feliĉe nenio ĉi koncerna plendigas la loĝantojn; la entrepreno ekde fino de la inĝenieraj laboroj tute ne malbeligas ĝian insulan

lokon, nek malpurigas la teran aŭ maran ĉirkaŭaĵon, dank'al ĉiaj prizorgoj, senĉesa kontrolado kaj preteco al tuja ekago urĝe bezonata.

Insulaj loĝantoj, kiuj amas maristan vivon povas nuntempe vivteni sin kaj labori komforte en moderne ekipitaj boatoj, kiel fiŝkaptistoj. Aparte sukcesas tiuj celantaj kaptadon de omaroj, kraboj kaj aliaj konkfiiŝoj, kies kaptaĵoj tuj eniras modernajn fiŝprocezajn fabrikojn. Plie abundas salmo-kulturejoj jam starigitaj multloke, ĉie kie taŭgas la akva medio.

Prosperas ankaŭ negocoj starigitaj por surmerkatiĝi la produktojn de diversspecaj gemetiistoj. Lokaj tradiciaj trikaĵoj aŭ nove elpensitaj vestaj faritaĵoj famiĝas pli ol antaŭe, kaj eĉ pli elstare famiĝas en la nuno la popularaj juvelaj artaĵoj bele kreitaj de orkadaj artistinoj.

El vidpunkto de eblecoj por libertempa ĝuado, disponeblas al la loĝantaro la ŝanco okupiĝi pri siaj ĉiuj diversaj intereso. Ne mankas kulturaj festivaloj, kaj sociaj eventoj okazas abunde tra la jaro. La Sankta Magnus festivalo pri klasika muziko okazas dum la mezsomeraj tagoj. Ĉiujare en junio, kiam alvenas por partopreni ne nur britaj muzikistoj, sed ankaŭ eksterlandaj muzikistoj, eĉ tuta orkestro foje vojaĝas al Kirkwall. Fine de majo ĉiujare okazas popolmuzika festivalo bazata en la havenurbo Stromness, kaj ankaŭ tiu allogas eksterlandajn partoprenantojn. Plie ĉiujare, en julio, starigas Stromnessanoj tutsemajnan festivalon iom maltrafe nomitan "Butikumada Semajno" - kiu havas sian "Butikumadan Reĝinon", kun serio de ceremoniaj devoj plenumendaj. Multaj diversaj aferoj okazas ĝis sabato, kiam la urbeto fariĝas ŝajnmerkato amuzejo! Vid-iĝas parado de maskovestitaj infanoj kaj plenkreskuloj, kurkonkursoj okazantaj tere kaj mare, piroteknikaĵoj kaj amaso da feriotagaj distraĵoj laŭ imagpovo kaj lerteca kapablo de la respondeca komitato.

Vintre okazas tiaj teatraj eventoj, kiaj la kristnaska pantomimo, la surscenigo de la elektita opero aŭ muzika komedio, la dramkonkursoj kaj, en la kamparo, plugadkonkursoj; somere okazas la agrikulturaj foiroj kaj la konkursaj boatfestoj. Funkcias multnombraj kluboj aŭ societoj, kie saminteresanoj renkontiĝas por ekzerciĝi pri

velado, naĝado, ĉevalrajado, muzikado, kantado, dancado, fotado, golfludado, gimnastikado, floranĝado, debatado, promenado sur kamparaj padoj aŭ klifoj, k.t.p. Aŭtune komencas vesperklasoj pri ŝajne senlimaj studobjektoj, kaj ĉiam bonkoruloj okupas sin favore al aliuloj, kiuj deĵoras en la diversaj, ĉiam pli multnombraj helpservoj.

KRISTNASKA FESTOEVENTO

"Vojaĝu elegante kaj retromoviĝu en la pasinteco", reklamas broŝuro-kovrilo de la pramservo al la nordaj insuloj de Skotlando. Nu, eble pravigas tiun aserton la prahistoria kutimo, kiu okazas ĉiujare en Kirkwall, ĉefurbo de Orkado je la Kristnaska Tago kaj denove je la festotago de la novjaro. Ĝi temas pri la tradicia Ba-ludo. "Ba" estas la orkada prononco de la angla vorto "ball"; do la tradicio nomiĝas pilkludo sed tute neordinara pilkludo, ĉar mankas reguloj kaj la ludejo estas la ĉefstratoj de la urbeto !

Kelkajn tagojn antaŭ la Kristnaska festo oni rimarkas kuriozan strangaĵon, eĉ konsternan al nescianta ekvidanta tion unuafoje. Ties surprizitaj okuloj ekvidas fortajn protektajn lignotrabojn fiksitaĵojn trans la montrofenestroj de la butikoj kaj la fenestroj de la domoj laŭlonge de la centraj stratoj de la urbo. Tiu malbeliga efiko temas pri la nepraj antaŭpreparoj neeviteblaj, ĉar protektilo necesas al la frakas-ebla vitro kontraŭ la pezo de la homaj korpoj, kiuj dum la ludo amase sin premas ĉe la vendejoj kaj loĝejoj ambaŭflanke de la stratoj, precipe kiam la ludo furioziĝas en la mallarĝa plimulto de la ĉefstratoj kaj la interligaj stratetoj.

La ludo komenciĝas en la urbocentro inter la katedralo kaj la urbodomo, tie kie larĝiĝas la ĉefstrato meze de sia tuta longo. Tagmeze, la 25-an de decembro kaj

la 1-an de januaro, ĉe antikva ŝtona kruco sur la eta herbejo antaŭ la katedralo, iu elektita eminentulo suprenĵetas la pilkon. Antaŭ li troviĝas amasiĝintaj la multnombraj ludantoj, pli/malpli cento el la danĝeramantaj kirkvalaj sportistoj. Iu ajn inter la viraj civitanoj rajtas partopreni en unu el la teamoj, kies membroj estas deciditaj laŭ kurioza maniero: ĉiuj sportamantoj, kiuj naskiĝis en la alta parto de la urbo aŭ kaze de enmigrintoj, ĉiuj kiuj alveninte eniris la urbon ĉe tiu flanko, devas aniĝi al la teamo nomita "uppies" (pr. Upiz), kiu signifas "Uloj de la alta parto". Same, naskiĝintoj aŭ enmigrintoj en la malalta parto fariĝas la teamanoj nomitaj "doonies", la Uloj de la malalta parto".

Stranga okazaĵo, sendube ! Tamen mezepoka historia klarigo donas sencon al la tradicio. Ŝajnas, ke potenca grafo nomita Henry St Clair finkonstruigis propran kastelon en la jaro 1383 kaj poste la urbo Kirkwall dividiĝis inter du mastroj. La administranto de la "Laverock", t.e. la tereno situanta iom pli altnivele, estis la episkopo, kaj tiu kiu administris la Burgh, t.e. la tereno pli apuda al la maro, do pli malalta tereno, estis Henry St Clair. La antaŭkatedrala herbejo apartigis la tiaman duoblan urbeton. La iniciatantoj de la Ba-ludo, tiuj mezepokaj urbanoj estis do aŭ "homoj de la eklezio", la nuntempaj "uppies" aŭ "homoj de la reĝo", la nuntempaj "doonies".

Tuj kiam sonas fajfilo, parenteze la ununura fajfilsono de la tuta posttagmezo, oni rajtas komenci la matĉon kaj la amaso da sportuloj ekbatalas. La spektaklo aspektas kiel giganta rugbea miksbatalo dum la tuta multhora daŭro de la ludo. Homamasoj svarmas jen suden jen norden eĉ vaporigante la superkapan aeron. Tiuj ludantoj rajtas pilkludi laŭ ia ajn maniero kaj laŭ siaj fortoj kaj ebloj. Aŭdiĝas neniu limiga fajfado de arbitracianto dum tiu miriga pilkludado, rilate kiun validas neniu regulo. La teamo de la "uppies" penadas, por ke la pilko espereble tuŝu ilian celmuron je la suda fino de la ĉefstrato; la "doonies" aliflanke celas enmarigi ĝin en la haveno je la norda fino. La lukto freneze furioziĝas, tri, kvar, eĉ foje pli ol ses horojn kaj certe ĝis post la mallumiĝo.


Komprenable neniu aŭtisto riskas aperigi sian veturilon en la apudeco de la urbocentro kaj spektantaj ĉirkaŭantoj devas resti viglaj, ĉar de tempo al tempo dispec-

iĝas la svarmo, tiu ŝajna miksbatalo. Tiam sin gardu la spektantoj, ke ili ne estu faligitaj teren nek estu hazarde kunigitaj meze de la ludanta amaso mem ! Tamen, en taŭga loko ambulanco staras preta!

Nu, kiam la pilko fine trafas la celon, juĝado estas farennda por decidi kiu ludinta sportulo pli meritas la honoron hejmen porti kaj, por ĉiam, posedi la trofeon. Tiu estas la pilko mem, speciala festopilko farita mane de loka metiisto, el le plej bona ledo kun la interno remburita per pulvorigita korko tiel, ke ĝi fariĝas kiel eble plej malmola. Longan tempon poste, eĉ jarojn, ĝi verŝajne vidiĝos pendanta ĉe fenestro en la hejmo de la fiera gajninto. Tiu decido ne ĉiam estas facile konsentita afero; foje estiĝas akra disputado, eĉ pugnobatalo, ĉar dum tiu longdaŭra batalado konsumiĝas granda kvanto da likvaj refreŝigaĵoj, plejparte alkoholaj kompreneble. Aliflanke povas esti, ke braveco elmontrita ĉiujare dum la Ba-ludo rezultigas tujan pacon pro antaŭkonsento pri la premioto.

Apenaŭ kredeble ŝajnas, ĉu ne, ke nuntempe troviĝas fervoruloj pri tia primitiva kaj korpopuna amuzaĵo. Tamen, laŭ paĝoj de la sekvontaj eldonoj de la loka gazeto, kiuj plenas de komentario pri la tuta dumtempa antaŭenigo de la agado kune kun rilataj fotoj, la Ba-ludo nepre estas forte enradikiĝinta orkada tradicio, kiu ankoraŭ superas kontraŭan sintenon fare de la urbaj instancoj kaj la respond-eculoj pri la bonstato de la civitanoj.

Irene Bennett



BALTAJ LINGVOJ

Litovoj kaj Letonoj apartenas al la balta tipo de hindoeŭropanoj. Tiuj ambaŭ nacioj restis unusolaj vivantoj de balta genro. Litovoj kaj letonoj estas kvazaŭ duonfratoj; krom komuna genro iliaj lingvoj estas similaj, sed pro historiaj eventoj ŝufiĉe diferencas, ĉar Letonoj, en la X1-a jarcento falis sub okupacio de Germanoj, kaj ilia lingvo iom post iom akceptadis multajn germanajn kaj eĉ rusajn vortojn. Do, dume, kvankam en ambaŭ lingvoj restis multaj samaj vortoj, frazoj k.t.p., estas sufiĉe malfacile kompreni unu la alian, sed ĝenerale eblas kompreni en multaj okazoj.

Estonoj apartenas al ugrofinna genro (Finnoj kaj - strange! - Hungaroj). Estona kaj finna lingvoj do estas tre similaj kaj Estonoj kaj Finnoj povas facile kompreni unu la alian, despli, ke ili estas najbaroj. Finnlando, post reapero de sendependeco, multe helpis, kaj ankoraŭ helpas, al Estonio.

Ĝis 1918 nek Letonoj nek Estonoj posedis sian ŝtaton, ĉar iliajn teritoriojn okupis fremduloj. Dum tiu periodo la litova granddukejo amikiĝis kun Pollando; ambaŭ estas sufiĉe grandaj kaj potencaj ŝtatoj. Bedaŭrinde la Litovoj falis sub la influo de Pollando kaj tio ege malhelpis al Litovio. Poste ambaŭ ŝtatoj falis sub la jugo de Rusio; tamen Pollando havis sufiĉe vastan aŭtonomion kaj la Litovoj male: la cara registaro iel penis definitive asimili la litovan nacion. Okazis verŝajne unika ekzemplo en la mondo: la rusa registaro malpermesis uzi la litovan lingvon, eldoni kaj legi litovlingvan presaron, instrui infanojn litovlingve. Tio daŭris 40 jarojn (1860/1904). Malgraŭ tio la Litovoj kaj ilia lingvo kaj presaro ne malaperis, dank'al tiuj, kiuj ne ektimis tiun malpermeson, kvankam ili riskis ekzilon al Siberio, instruis, eldonis litovlingvan presaron subplanke.

Mi estas fiera, ke la litova lingvo, dank'al tiuj herooj, denove vivas kaj aŭdeblas ne nur en Litovio, sed ankaŭ en multaj eksterlandaj universitatoj. La franca profesoro M. Meillet, en sia verko "Les langues de l'Europe Nouvelle" (La lingvoj de nova Eŭropo) konsilas al tiu, kiu volas ekaŭdi eĥon de la antikva hindeŭropa lingvo, veni Litovion por ĝin aŭskulti.

Viktoro Baniulaitis

el Klaipeda, Litovio. 11

Ĉirkaŭ Eŭropo

En aprilo forlasis vilaĝon de la departemento Vendée nekutima veturilo, ĉevaltirata ruldomo, kun tri vojaĝantoj, Gudule, juna virino, bestkuracisto, ŝia kunulo Laurent, pejzaĝisto, kaj ilia kelkmonata filino, Lola. La nomo de la ĉevalino estas Camille kaj kunvojaĝas hundino, Pâquerette (Lekanteto). Ilia celo ? Ne preciza; vagado tra Eŭropo helpe de esperanto kaj esperantistoj. Vivrimedoj ? survojaĵ laboroj. Post 97-taga, 1 300 km.a irado ili nun atingis la belgan limon. Survoje Gudule skribas siajn spertojn en taglibro. Riĉajn spertojn. Interesajn, kiuj meritas diskonigon pro la priskribo de la laŭiritaj vojoj, pro la renkontitaj homoj, pro la faritaj laboroj. Jen kelkaj partoj de tiu taglibro.

Foririnte de Amboise fine de julio, ni laŭiris la riveregon Loire ĝis Blois. Ni trairis la Sologne, paradiza regiono pro siaj arbaroj, siaj vojetoj, siaj ekvideblaj bestoj; paradiza ankaŭ por Camille pro sia ebeneco ! Pluirante norden ni atingis la Briare-kanalon.. Tie ni admiris la grandegan konstruaĵon, la kanal-ponton. Dank'al tiu kanal-ponto la barĝoj povas transiri la Loire. Ni decidis sekvi la haŭlo-vojon...kvankam ne estas permesite veturi tie. Ni preteratentas la panelon. La vojo estas belega kaj permesas nekutiman vidon de la regiono. Baldaŭ ni devas transiri la kanalon sur ponteto. Temas pri eta ponteto! La alirangulo ne estas pli larĝa ol 45 gradoj. Sed ne eblas reiri! Unuflanke la kanalo, aliaflanke la taluso. Nura vojo, la transira! Gudule preferas preni Lola el la ruldomo en siajn brakojn. La unua parto de la ruldomo bone aliras la ponton sed la meza parto tuŝas la randmuron ambaŭflanke. Camille timas, despli ke ĝi vidas la akvon tra traboj de la ponto. Boato pasas sub la ponto. La promenantoj mokas nin. Camille devas retroiri sed post 3/4 metroj, haltas. Laurent insistas. Camille, ĝenata de la pont-deklivo, tamen obeas... Post ŝvitigaj provoj la ruldomo finfine trovas la taŭgan pozicion por transiri. Ĝi antaŭeniras sed blokiĝas je la lasta metro. Sed la tria provo montriĝas sukcesa, kvankam Camille ne ŝatas la bruon de la planko. Ni

haltas kaj decidas tagmanĝi tie antaŭ ol alfronti novan obstaklon, kluzon turaspektan, kiun ni sukcesos transpasi post maljungado de Camille !

Ni atingas la regionon Champagne. Kaj imagu, kion oni faras en tiu regiono en septembro ? Oni rikoltas la vinberojn por fari la mondkonatan ŝaŭmvinon. Ni kontaktis rikoltiston, kiu konsentis dungi nin sed, poste, ĉar ni ne havas telefonon (!!) rifuzis. Feliĉe alian ne ĝenis nia vivmaniero . Ni povos iom plenigi nian dangere platan monujon ĉijare la vitejoj suferis pro frosto kaj melduo. La rikoltado daŭras malpli longe ol antaŭvidite. Sed ĉar ni jam de 15 tagoj estas tie mi povos labori dum 10 tagoj. La laboro estas nur fizika sed la etoso estas tre simpatia. La laboro komenciĝas matene je la 7.30-a horo. Po 2 personoj laboras ĉe ĉiu vitvico, unu ĉe ĉiu flanko, por ne forgesi grapolojn, kiuj ofte samkoloras kiel la folioj. Ni atentu la fingrojn de la kunlaboranto ! Ĉiu havas korbon. Kiam ĝi estas plena , portisto prenas ĝin al la transportilo. Je la 12-a okazas la komuna tagmanĝo, ĉe granda tablo La aperitivo konsistas el ĉampanvino, kompreneble. La lastan tagon, kiam estas atingita la vinber-kontingento, okazas la "cochelet", la festo: festeno ĉe kiu ĉampanvino reĝas...Sed antaŭ ol fariĝi reĝa vino, la beroj estas metitaj en presilojn, kiuj entenas ĝis 12 000 kilogramojn. Presado okazas tri fojojn. La unua presado eligas sukcon, kiu fariĝos unuakvalita vino. La dua presado eligas la pli grandan kvanton da vino, pli ordinaran. La trian presitaĵon oni uzas por fari alkoholon. Poste la suko estas filtrita. Ĝi restas dum 4 aŭ 5 monatoj en grandaj kuvoj por fermentado kun temperaturo de 37°. Oni enboteligas ĝin. Formiĝas, en la boteloj, feĉo, kiu per kongelado, grupiĝas je la nivelo de la kolo. Tiu feĉo-ŝtopilo estas elfetita de la ferment-gaso, kiam oni malfermas la botelon. Poste oni aldonas fermentaĵon en la botelojn, kiuj estas definive ŝtopitaj kaj stokitaj kuŝantaj. Dum unu jaro ili estos regula turnitaj. La "sekreto", la miksado de tri diversoriginaj vitoj: "pinot", "chardonnay" "meunier" .

(daŭrigota)

RENKONTOJ— La 14-an de julio, ĉe la eliro de la arbaro Boulogne, ni haltas antaŭ kastelo por peti la permeson tranokti tie ĉi. Bonvenigas nin la gardisto, kiu transdiras nian peton al la bienposedanto. Jesa respondo; ni metu la ruldomon kontraŭ la domo de Tristan, la arbargardisto, 20-jaraĝa. Post la komuna manĝo ni diskutas pri bestoj. Iom post iom Tristan, iom tro trinkinta, malkaŝas, ke li estas monarkisto, kaj preskaŭ ploras parolante pri la morto de la reĝino Marie-Antoinette (ne forgesu, ke tiu renkonto okazas la 14-an de julio !). Li insistas por ke ni vizitu la Kastelon Chambord; li disponigos al ni biciklojn kaj zorgos pri Camille. Tiel estis, kaj ni trapasis mirindan tagon. Dankon Tristan !



NI RIDU

Aŭtomobilisto ferias. Li traveturas la irlandan kamparon. Li alvenas ĉe travadejo. Li demandas preterpasantan farmiston; " Ĉu la akve tie ĉi estas profunda ? ". La respondo venas: " Ne, sinjoro".

La aŭtomobilisto pluiras en la travadejon... kaj la akvo supreniras super la radojn, la kapoton, eĉ enfluas tra la flanka fenestro. Elaltiĝante la kondukanto koleregas: " Kial vi diris, ke la akvo ne estas profunda ? " — " Ĝi altiĝas nur ĝis la korpomezo de miaj anasoj kaj ili ne estas pli ol dek kvin centimetrojn altaj."

Meze de aŭgusto. Ni estas survoje al la vilaĝo, kie ni decidis tranokti. Aŭtomobilo preterpasas nin kaj haltas. Paro eliĝas kaj donacas al ni panon, ĉokoladkukojn, kaj sekan panon por Camille. Fakte, kvaronhoron antaŭe ni jam renkontis la viron promenantan bicikle, kaj salutis lin. Li estas panfaristo. Li proponas al ni tranokti en ilia domo. Tio devigas nin reen veturi sed kiel afablaj ili estas ! Ni akceptas la proponon. Ni vespermanĝas kun ili. David enlitiĝas je la 9-a ĉar li eklabors jam je noktomezo. Ili estas pli junaj ol ni kaj, aventureme aĉetis tiun panfarejon la antaŭan jaron. La postan tagon, dimanĉon, ili proponas vizitiĝi al ni la urbon Troyes. Kompreneble ni konsentas. Post la siesto de David, ni enaŭtiĝas. La aŭto, kiu estas pli ol kvindekjara paneas pro manko de benzino. Motorciklisto konsentas iri al proksima benzin-stacio kaj alporti al ni kelkajn litrojn da ŝatata livaĵo. La motoro refunkcias...ĉar Laurent puŝas ĝin. Ne gravas, ĉar Troyes estas tre bela urbo. La postan matenon ni ellitiĝas je la 4-a por rigardi David kiu laboras kaj ni foriras.



POR VIA DISTRO


NIA KONKURSO

La du gajnintoj estis persone
informitaj pri sia sukceso. Ili estas

Juanita TURBILLON (Tours)

Blaise BERTHONNEAU (Bages).

Varmajn gratulojn al ili.



HORIZONTALE : 1. Li interesiĝas pri la cerbo - 2. Malkonfesi - Oni faras ĝin ĉe tuko - 3. Forte - Ĝi malfermas pordon - 4. Malokupi - Komenco de kazeigado - 5. Fideleco - 6. Salono (rad.) - Senprokrasta - 7. Ĝi montras kunecon - Ĝi montras inklino - proporcieco (rad.) - 8. Paĝaro (rad.) - 9. Oni trovas ĝin sur akvo - Interjekcio - 10. Ĉina vojo - Gaso - 11. Arbo - Ortoptero (rad.)

VERTIKALE : A. Vigle pensanta - B. Organika teksaĵo - Ekstrema flanko (rad.) - C. Ili estas en tiu loko - Kontrakto (rad.) - Ĉ. Ĝi esprimas grandecon - Tegaĵo - D. Ĝi anstataŭas la viron - Japana soleno (rad.) - E. Same je - lo taŭga (rad.) - F. Sub la kapo (rad.) - Sentenco - G. Vesto - Numeralo - Ĝ. Malnova mezurunuo - Korneca elkreskaĵo (rad.) - Interjekcio - H. Specjato al iu ejo - Prepozicio - Kavigi (rad.) Ĥ. Frakcio - Supraĵo (rad.).

LA VIVO EN GRESILLON

KUNVENO DE LA KOMITATO – 19-an DE OKTOBRO 1997

Ĉeestas D. kaj P. Babin, H. kaj F. Boyet, G. Dairon, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Métivier, P. Naulet, M. Noulin, J. Vincent. La aliaj komitatanoj senkulpiĝis.

D. Babin prezentas la raporton de la Departementa Komisiono pri Sekureco. La konkludo estas, ke pluraj gravaj laboroj devas esti faritaj rapide; nur post ilia realigo la kastelo ricevos la permeson malfermi siajn pordojn. Temas pri: tuta refaro de la elektra sistemo, instalado de fumdetektiloj kaj de alarmiloj kaj kelkaj malpli kostaj aranĝoj. Venontjare pliaj laboroj estos nepre farendaj. La financoj ebligis la pagon de granda parto de la unua parto de la laboroj. Sed estos tamen necese alvoki la helpon de la societanoj. La someraj aktivaĵoj povos okazi, kiel antaŭvidite sed estas necese nuligi la Printempan Renkonton de Infanoj. Subvencioj estos petataj de la departemento kaj de la regiono, eĉ de aliaj oficialaj instancoj, sed oni devas prezenti la fakturojn, do unue pagi.

STAĜOJ 1997– La nombro da staĝanoj estiĝiomete pli granda ol la antaŭan jaron kaj pli ekvilibre dispartigita. Neniu speciala problemo prezentiĝis. La sistemo de 1-a grada kurso en du partoj plaĉis al la partoprenantoj. La kurso pri tradukarto estis altnivela. Malgraŭ la ĉeesto de multaj eksterlandanoj la kurso pri "lernado de la franca lingvo pere de esperanto" ne akceptis vizitantojn. Multe interesis la ĉeestantojn la korbofarado gvidata de Juanita Turbillon. La ekzameĵoj ricevis mezan sukceson.

STAĜOJ 1998– Dum la somero de la venonta jaro okazos studperiodoj de la 19-a de junio ĝis la 21-a de aŭgusto.. De la 20-a ĝis la 31-a de julio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizos instrutreinan seminarion gvidatan de d-ro Duncan Charter kaj d-rino Katalin Smidéliusz. Samtempe gvidos kursojn Nina Korjenevskaja kaj Przemek Grzybowski. Ankaŭ instruos en junio, julio, aŭgusto J. Turbillon, J. Vincent, A. Cherpillod, P. Gubbins, M. Guzzi, C. Gacon. Pierre Métivier prelegos pri la Nantes-edikto kaj pri la urbo Saumur dum la sama epoko. Administros: L. kaj P. Babin, D. kaj N. Babin, J. kaj D. Moirand. Novaj ekskursoj estos proponitaj: vizito al la "bluaj minejoj" (ardezaj minejoj) apud Segré, al muzeo Tatin apud Cossé-le-Vivien kaj aliaj vizitindaj lokoj.

La kunveno finiĝis je la 17-30 h.

La sekretario:

Guy DAIRON

« KULTURAJ KAJEROJ »

regule atingos vin
se vi
tuj reabonas



I.L.E.I

LA INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ
INSTRUISTOJ organizos de la 20-a ĝis la 31-a de
julio 1998,

EN GRESILLON

INSTRUTREJNAN SEMINARION

20/31-07 - D-ro Duncan Charters.

27/31-07: D-rino Katalin Smidéliusz.

Informoj kaj aliĝoj: Kultur-Domo Grésillon.



NE PLU CERBUMU

NUR PETU LA KATALOGON DE NIA

Libro-servo

J. VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie

FR-49150- BAUGE

GRAMATIKO PER BONHUMORO



PLI - PLU

PLI esprimas **KOMPARON** kaj montras kvanton
aŭ gradon superan al iu alia
— li estas pli stulta ol malica

PLU montras **DAŬRADON DE** stato aŭ ago :


— **pli longatemp**e

- li volis boksi plu, sed li ne povis.

— **pli malproksime** :

- iru unu pason plu.


RIM : kun nea vorto PLU montras ĉesigon de
ago aŭ stato : ne plu ploru ; ne plu antaŭen iru



Mi ne plu havas laboron. Oni anstataŭigis min per
maŝino ne pli dika ol mia mano.



Ne plu lavu mian cerbon, panjo ! Mi fariĝos
ankoraŭ pli malatenta en la lernejo !



Ĉu vi intencas plu aĉeti librojn por pli ampleksigi
la kolekton?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Libro vendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkupoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale lajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34